

ESPERANTO

INTERNACIA REVUO ESPERANTISTA

N-ro 530

DECEMBRO 1949

Nova E.P.C.-libro

Praktika libro por la praktika homo

KOMERCAJ LETEROJ

de

C. A. Pruissen

Ĉi tiu nova verko estas pli ol gvidilo al la komerca korespondo. Ĝi instruas pri multaj fakoj de la internacia trafiko, kaj estas natura elvolviĝo en la komerca literaturo.

Nepre havinda, eĉ por la nekomercisto

Prezo 2 ŝil., afranko 2p., aŭ 9 poŝtaj respondkuponoj

Eldonita de

THE ESPERANTO PUBLISHING COMPANY LTD.

Mendu ĉe enlanda libroservo aŭ ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

ANONCETOJ

Kosto : du pencoj por ĉiu vorto, aŭ internacia respondkuponon por ĉiu duo da vortoj.
Ĉiu anoncanto morale devigas sin respondi minimume unu fojon al ĉiu kiu skribas.
Anonceto por iu numero devas atingi nin antaŭ la 6-a de la antaŭa monato.

Mi deziras korespondi kun korespondantoj en aliaj landoj kaj interŝanĝi poŝtmarkojn. N. G. Bevan, 1144 Eyre Street, Ballarat, Victoria, Aŭstralio.

Ne-katolikoj, kiuj deziras informojn pri la katolika kredo, povas ricevi ilin senpage per la Internacia Katolika Informejo. Sekretariejo : Fraterhuis, Loonopzand (N.Br.), Nederlando.

Filatelistoj ! Sendu al mi 100 diversajn poŝtmarkojn el via lando kaj vi ricevos 150 el mia. Adreso : F-ino Waldner, Babits 5, Esztergom, Hungarujo. Certa respondo.

Serĉas gekorespondantojn el la tuta mondo, precipe el ekstereŭropaj landoj, 26-jara hungara fraŭlo S-ro Miklós Abrahám, Vöröshadsereg-utja 4/b.II.6, Budapest XII, Hungarujo. Certe respondos.

Geografia instruisto, Technical School, Brierley Hill, Staffs., Anglujo, danke ricevos bildpoŝtkartojn, ĵurnalojn, aŭ fotografiaĵojn de homoj kaj lokoj el ĉiuj landoj en la mondo. Ĉiu sendanto ricevos reciproke bildpoŝtkarton anglan. Dankon.

50 knaboj, 10–16 jaraj, deziras korespondi kun geknaboj en ĉiuj partoj de la mondo. Nepe respondos. Esperanto, Lycée de Garçons, Rue Porte d'Assaut, Perpignan (Pyr. Or.), Francujo.

Pro malfeliĉaj familiaj okazoj mi ne povas nuntempe respondi al miaj gekorespondantoj. Mi skribos tuj kiam mi povos. F-ino G. Perrier, Montendre (Charente-Maritime), Francujo.

Koro Esperanta, en Brno, Ĉeĥoslovakujo, sendas kontraŭ 4 resp. kuponoj tri teatraĵojn, kontraŭ 2 resp. kuponoj unu vestinsignon, kontraŭ 1 kvindek diversajn glumarkojn aŭ dek poŝtkartojn.

Bonvenaj estas ĉiuj skribaĵoj je letervespero aranĝata de Herning Esperanto-klubo, kiu garantias respondon almenaŭ unufoje. Adreso : S-ro H. P. Jespersen, Bryggergade 3, Herning, Danlando.

Juna farmaciisto deziras korespondi tutmonde. S-ro Antti Simanainen, Apteekki, Koijärvi, Finnlando.

Por 3–4 semajna senpaga restado en gaja gejunula rondo kaj en siaj hejmoj invitas liceanoj en Somero alilandajn gejunulojn, somere 1950. Adreso : Liceo, Somero, Finnlando. Skribu jam nun !

Tutmonda Katolika Adresaro Esperantista, 1950—Kvina jaro. Enskribo de nomo, adreso, aĝo, telefono, korespond-deziroj—du internaciajn respondkuponojn (kun senpaga ekzemplero). Limdato : 15 Decembro. Aperos : Januaro 1950. Lorcán OhUiginn, Bóthar Glasárd 16, Dublin, Irlando. 1949a eldono ankoraŭ havebla.

Itallingvo-perfektigemuloj plensukcesos ! Legu jarlibron 1948 p. 153 ; 1949 p. 43.

Sudafrika Esperanto-Asocio. Por kunligi la esperantistojn de Sudafriko ni intencas fondi S.E.A. Interesiĝantoj skribu al D-ro S. Liebeck, P.O.B. 2721, Cape Town.

La Preĝo de Nia Sinjoro. Signifoklarigo de Hamblin. “Bona klarigo, bona papero, bona preso kaj bona lingvo”—*Heroldo*. Sendu unu respondkuponon al Hipsley, Seventeen, Abbots Road, Kings Heath, Birmingham, Angllando.

S-ino M. Mondeŝka, Nansen 29, Sofia, Bulgarujo, korespondado, interŝanĝo ĉiulande.

S-ino deziras korespondi pri abelbredado, vegetarismo, naturkuracado, mistiko. Adreso : “Esperanto”, Harjutori 12, B, 50, Helsinki-P., Finnlando.

Korespondi kun tuta mondo deziras kursanoj de Esperanto-Klubo, Veseli nad Moravou, Ĉeĥoslovakujo.

Pri botaniko, arbarkulturado, ĉasado kaj laboro en arbarsegejoj deziras korespondi S-ro František Hynšt, Veseli nad Moravou 1020, Ĉeĥoslovakujo.

Poŝtmarkojn uzitajn po 50 ĝis 100 pecoj deziras interŝanĝi S-ro Jaromir Pavlacký, Veseli nad Moravou, Ĉeĥoslovakujo.

Letervesperon organizas sekcio Mechelen de Flandra Ligo Esperantista, la 8-2-1950. Sendu ĉiajn korespondaĵojn al F-ino M. Buts, Battelsteenweg 322, Mechelen, Belgujo. Respondo garantiata.

Tajlortranĉistino interesiĝas pri novaj virinvest-tranĉoj tutmondaj. Danovski Vaclav, Chmielna 28, Warszawa, Polujo.

PORTU LA STELON !

Tio estas simpla kaj efika propagando.

UEA-insignoj, broĉo aŭ butono,

po 1ŝ. 6p. aŭ 6 rpk. afrankite.

Tre belaj arĝentumitaj insignoj, broĉo aŭ butono.

po 2ŝ. 9p. aŭ 11 rpk. afrankite.

Mendu ĉe U.E.A.

POR VIA ALBUMO

aŭ por via korespondanto

La plej belaj bildpoŝtkartoj ĝis nun aperintaj.

Fotoj de slovakaj popolkostumoj en nigro-blanko aŭ en naturaj koloroj, kun teksto en Esperanto.

Por serio el dek la prezoj estas :

Fotoj 3 ŝil., afranko 2p.

Kolorbildoj manpentritaj 10 ŝil., afranko 3p.

★

Mendu ĉe U.E.A.

ESPERANTO

INTERNACIA REVUO ESPERANTISTA

N-ro 530

DECEMBRO 1949

GENERALO BASTIEN

80-jaraĝa

Ni volas antaŭen kun kredo, fervor',
Benante la Majstron pro verko,
Kaj lian anaron de plej frua hor'

Fidelan al li, ĝis la ĉerko.
La mond' aliĝos, la temp' pasos for,
Sed vivos eterne pri ili memor'.

Je la 21a de decembro 1949 la Honora Prezidanto de U.E.A., S-ro Generalo Louis Bastien, naskiĝinta en 1869, estos 80-jaraĝa. Nia Majstro naskiĝis dek jarojn antaŭe kaj ŝajnas al ni nuntempuloj preskaŭ nekredeble, ke proksimsamaĝulo de la Majstro estas inter ni kaj malgraŭ aĝo kaj la aĉo de la tempo, daŭre interesiĝas pri la movado, partopreninte tre aktive ĝis 1947.

Generalo Bastien apartenas al tiu brila sekvantaro de D-ro Zamenhof, kies nomoj estas nedisigeble ligitaj al tio, kion la historiistoj de nia movado nomis *la franca epoko*. Ho ve, el ili restas nur malmultaj kaj inter tiuj malmultaj estas la nuna jubileanto.

Aliĝinte al nia movado en la jaro 1902, li estas konata de multaj samideanoj el la dua generacio esperantista pro la *Naŭlingva Etimologia Leksikono*,

vortaro kompilita kun zorgo kaj diligento; sed pli konata fariĝis Generalo Bastien kiel persista propagandisto en Francujo, fidela kunlaboranto de la tiama Societo Franca por la propagando de Esperanto. La intensa laboro pri organizaj aferoj kondukis lin al la problemo de la internacia organizaĵo esperantista je kies realigo li kontribuis laŭ sia konvinko, persiste kaj sindone.

La kroniĝon de tiu laboro organiza li povis ĝisvivi en la definitiva (almenaŭ por nia epoko) solvo de la problemo, en kiu li decide partoprenis. Dum la Berna Kongreso 1947 la nova statuto de nia organizaĵo estis akceptata kaj kun ĝi la malnova nomo *Universala Esperanto-Asocio*, titolo

gravurita en la memoro de miloj kaj miloj da esperantistoj.

Se ni hodiaŭ povas paroli pozitive pri neplua


ekzisto de la organiza problemo en niaj diskutoj, ni memoru la partoprenon de la jubileanto en tiuj ide-bataloj. La dua milito, kiu tiom grave ŝanĝis la mondon, kaj precipe nian agadpovon, devigis la respondeculojn de la du disputantaj fratorganizaĵoj trovi solvon. Ne solvon surpaperan, sed daŭran. Post longa ekzameno de ĉiuj faktoroj, post serioza studo de agoj kaj aktoj, interkonsento estis trovita. Ĉu necesas memorigi, ke ni dankas la realigon de tiu akordo al la filozofia sinteno de Generalo Bastien? Ni diru tion hodiaŭ por ke la okdekjarulo sciu, ke lia laboro por Esperanto ne estis vana.

Li ne povis vidi la triumfon de nia afero, la enkondukon de nia

lingvo, kiel deviga instrufako; sed almenaŭ ĉi tiun kontentigon li povas havi, ke tiu venena atmosfero interesperantista malaperis. Se ni ne venkis la eksteran malamikon, li tamen kunhelpis je la venko de malamikeco interna, kaj tio estas ago dankinda.

Maloftaj estas tiuj, kiuj, lerninte la lingvon kaj laborinte por ĝi, restas fidelaj dum la tuta vivdaŭro. Tial konvenas, ke ni ne forgesu tiajn obstinulojn nevenkeblajn kaj ni montru ilin kiel ekzemplojn al okazaj hezitemuloj kaj dubemuloj. Al la jubileanto iru je la 21-a de decembro niaj gratuloj kaj danko!

H.ĵ.



LA PAĜO DE LA KRITIKANTO

(Konstanta kritiko estas utila kaj dezirinda. Nenio estas firma en la mondo, ĉio estas submetata al la fluo de la tempo. Por ekkoni la mankojn en nia agado, precipe en la propagando kaj en la pratika uzado de nia lingvo, ni publikigas de tempo al tempo *kritikajn konsiderojn* pri eroj en nia agado, kun eventuala respondo de sam- aŭ malsam-opinianto. Ni komencas la rubrikon per la sekvanta konstato de nia komitatano Tiboro Sekelj. Lia argumentado estas laŭ nia opinio tute prava.—Redaktoro).

For la timemon !

Eble pro tio, ke en mia familio la hejma lingvo estas Esperanto, ĉiam surprizas min—kaj iom malagrabla—kiam mi aŭdas aliajn esperantistojn paroli inter si naciajn lingvon. Des pli mirigas min tio, se ambaŭ kunparolantoj estas konataj kaj bone parolantaj samideanoj, se ilia rilato ekestis danke al Esperanto, se unu el iliaj ĉefaj komunaj interesoj estas la movado. Sed mia surprizo transformiĝis en konsterniĝon, kiam mi aŭdis de membroj de grava nederlanda esperanto-grupo, ke ili post longa kaj “konvinka argumentado de la prezidanto” oficiale decidis ne uzi Esperanton ekster la klubaj kunvenoj ĉar tio povus ridindigi nin antaŭ neesperantistoj. Ŝajnas al mi necese pridiskuti tiun decidon.

Estas vero, ke nia celo ne estas forlasi niajn naciajn lingvojn kaj anstataŭigi ilin per la internacia, sed por lerni tiun ĉi, oni bezonas uzi ĝin en ĉiuspecaj homaj rilatoj, familiaj, amikaj, sociaj, oficialaj kaj komercaj, profitante ĉiun okazon por ĝia praktika aplikado. Se ni limigas nian Esperanton al la klubaj kunvenoj, la maloftaj renkontiĝoj kun eksterlandaj samideanoj, kaj al la ilustritaj poŝtkartoj, ĝi ĉiam sonos en niaj oreloj kiel fremdaĵo, kaj el nia buŝo ĝi eliros kiel balbutata artefaritaĵo. Kun bedaŭro sed kun necesa sincereco ni konfesu, ke 80% de nia samideanaro ankoraŭ baraktas kun la gramatiko kaj la elparolo eĉ dum la plej simpla konversacio, elmontrante praktike la konsekvencojn de tia *dimanĉa esperantisteco*, laŭ kiu por paroli nian lingvon oni bezonas specialajn tagon kaj horon, kaj konvenan kluban ejon.

Ni forigu la timemon, kaj ni faru Esperanton nia vera, natura lingvo, uzebla kaj uzenda ĉie kaj ĉiam ! Kiam ni renkontiĝas kun verdstelano ni ne pensu pri lia nacieco, sed ekparolu en la internacia lingvo kvazaŭ en la natura lingvo de ambaŭ. Mi estas certa, ke tia ago ne ridindigos nian ideon en okuloj de aliuloj, sed tute male, multaj okazoj pruvis al mi, ke fremdaj aŭskultantoj en tiaj cirkonstancoj konvinkiĝas pri ĝia praktika uzeblo.

Sed ni eĉ pli kuraĝiĝu. Kiam ni vojaĝas eksterlande kaj volas aĉeti poŝtkarton, ni ne

provu klarigi nian deziron al la vendistino per angle aŭ france dirita frazo, sed ni forigu la timemon kaj demandu rekte en la internacia lingvo :

“Kiom kostas ĉi tiu poŝtkarto ?”

Se la fraŭlino montras surprizon pro la ne-kompreno, ni surpriziĝu eĉ pli multe kaj demandu kun aplombo :

“Ĉu vi vere ne parolas Esperanton ?”

Kaj poste ankoraŭ restas sufiĉe da tempo por aĉeti la poŝtkarton en iu ajn alia lingvo. Ni, la centoj aŭ miloj da vojaĝantaj Esperantistoj—nur du kongresoj dum ĉi tiu jaro nombris 3000 gesamideanojn !—ripetu tion en la banko, en vagonaro, en la turisma agentejo, en la poŝtejo, en la hotelo kaj en la kafejo de ĉiuj lokoj, kiujn ni vizitas. Tiam, iom post iom ĉe ĉiuj, kiuj nin aŭdis, ekestos sento pri la bezono lerni la internacian lingvon ĉar evidentiĝas ĉiam pli kaj pli, ke ekzistas tuta amaso da klientoj, kiuj deziras esti prizorgataj en Esperanto.

Ni estu konsciaj, ke dum ni mem ne estimas nin, ĉiuj niaj teoriaj argumentoj restos senefikaj.

For la timemon, do, kaj la estonteco estos nia !

Tibor Sekelj.

Urĝa alvoko al ĉiuj delegitoj de U.E.A. !

Estas fakto, ke dum multaj jaroj la delegitoj de U.E.A. faris tre utilajn servojn al la Movado, helpante Esperantistojn kaj iafoje eksterulojn. Bedaŭrinde, tamen, ne multaj el la ordinarnaj Esperantistoj sufiĉe scias pri tiuj servoj kaj ilia granda valoro. Ni opinias, ke se la Esperantistaro pli multe scius pri tiuj bonaj kaj utilaj servoj, tiu informo estus por ili forta kuraĝigo, kaj samtempe bona propagando por nia U.E.A.

Ni do sendas gravan kaj urĝan alvokon al ĉiuj delegitoj, kiuj jam faris utilajn kaj interesajn servojn, aŭ dum aŭ post la dua mondmilito. Jen la propono. Vi, niaj estimataj helpantoj, delegitoj de U.E.A., bonvolu sendi kiel eble plej baldaŭ mallongan resumon pri unu-du interesaj servoj faritaj de vi, **kun faktaj detaloj**, por ke ni havu novan kaj interesan materialon por nia Esperanto-propagando.

Ni antaŭdankas al ĉiuj delegitoj, kiuj eventuale sendos al ni la bezonatan materialon. Tial ke la afero estas urĝa, bonvolu sendi vian informon al la Sekretario de U.E.A., Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo.

1859 — 15-a de Decembro — 1949

Naŭdek jaroj pasis de la tago kiam la kreinto de nia lingvo venis en la mondon. **Multon** oni jam skribis pri la, sed neniam **tro multe**. Ju pli ni studas la vivon de ĉi tiu geniulo, des pli ni miras pri lia profunda scio de la homa naturo, pri la eblo gajni la amason por revolucia ideo spirita, kia ja estas internacia lingvo. Ni neniam povos sufiĉe insisti ĉe novaj adeptoj, ke ili konatiĝu ne nur kun la lingvo, sed ankaŭ kun ĝia kreinto, legante kaj enprofundiĝante en la ideoj de nia Majstro. En biblioteko esperantista devas ne manki la brila biografio pri li, verkita de Edmond Privat: *Vivo de Zamenhof*. Ĝi devus esti apud la *Fundamento de Esperanto* kaj la *Fundamenta Krestomatio*. En la lasta verko troviĝas la plurfoje tradukita traktaĵo *Esenco kaj estonteco de la ideo de Lingvo Internacia*, legaĵo same altvalora kiel la tradukoj de D-ro Zamenhof, prave konsiderataj kiel **klasikaj**.

En la *Originala Verkaro* kaj en la jam publikigitaj *Leteroj* ni disponas pri pliaj fontoj de la agado de D-ro Zamenhof. Riveligas el ĉio la ekstrema modesto pri propra faro—signo de vera genio. Tio estis granda kontrasto rilate al aŭtoro de alia *mondlingvo*, kiu la unua sukcesis arigi amasojn kaj krei literaturon. Prelato Schleyer regis aŭtoritate el inklino kaj konvinko pri propra kompetento, dum Zamenhof modeste antaŭmetis sperton kaj

dedukton kiel la ĉefajn argumentojn. Nenio tion ilustras pli bone ol la *Antaŭparolo al la Fundamento de Esperanto* el kiu ni represas kelkajn liniojn, kies vero neniam malaktualiĝos.

“Por ke ia regno estu forta kaj glora kaj povu saĝe disvolviĝadi, estas necese, ke ĉiu regnanto sciu, ke li neniam dependos de la kapricoj de tiu aŭ alia persono, sed devas obei ĉiam nur klarajn, tute difinitajn fundamentajn leĝojn de sia lando, kiuj estas egale devigaj por la regantoj kaj regatoj kaj en kiuj neniuj havas la rajton fari arbitre laŭ persona bontrovo ian ŝanĝon aŭ aldonon. Tiel same, por ke nia afero bone progresadu, estas necese, ke ĉiu esperantisto havu la plenan certecon, ke leĝdonanto por li ĉiam estas ne ia **persono**, sed ia klare difinita **verko**.”

Tiu verko do estas la *Fundamento de Esperanto*. La fidela sekvo de la admono de D-ro Zamenhof, ne atenti je iaj kapricoj, sed klopodi ke Esperanto **estu** lingvo, ke ĝi disvolviĝu kaj **servu**, tio certigis la konstantecon de nia tuta laborado. La absolute perfekta lingvo neniam ekzistos, sed la plej taŭga, pruvita per miloj da faktoj, la ekzisto de uzantaro, de literaturo, tio estas nur Esperanto. Tion ni pripensu je la 15-a de decembro, kiam kunvenos la Esperantistoj por memori la naskiĝon de la kreinto de Esperanto. *H.J.*



D-RO L. L. ZAMENHOF

Tre malproksime ĉiuj ni staras
La unuj de la aliaj . . .
Kie vi estas, kion vi faras,
Ho, karaj fratoj vi miaj ?

* * *

Vi en la urbo, vi en urbeto,
En la malgranda vilaĝo,
Ĉu ne forflugis kiel bloveto
La tuta via kuraĝo ?

* * *

Ĉu vi sukcese en via loko
Kondukas nian aferon,
Aŭ eksilentis jam via voko,
Vi lacaj perdis esperon ?

* * *

Forte ni staru, brave laboru,
Kuraĝe, ho nia rondo !
Nia afero kresku kaj floru
Per ni en tuta la mondo !

L. L. Zamenhof.

TRA LA MONDO ESPERANTISTA

Britujo

Multaj samideanoj sendube legis en ĵurnaloj aŭ eksciis per radiodissendoj pri la kuraĝa vojaĝo de du junaj angloj trans la Atlantikon en malgranda velboato nomita *Nova Espero*. Ili fakte estis ankoraŭ sur la maro dum la Universala Kongreso en Bournemouth kaj atingis Anglujon kelkajn tagojn poste. La nomo de la boato ne estas hazarda; la du maristoj, la fratoj Colin (membro de U.E.A.) kaj Stanley Smith, havas inter aliaj idealoj la fortan disvastigadon de Esperanto. La boaton mem ili nun montras diversloke al la publiko kun la celo antaŭenigi siajn idealojn por la bono de la homaro, kaj ili laŭeble aranĝas por la propagando de Esperanto diversmaniere je tiaj okazoj. Dum pluraj semajnoj en septembro kaj oktobro tia montrado al miloj da vizitantoj okazis en halo en la grava angla marborda urbo Blackpool. Dank' al la klopodoj de Brita Esperantista Asocio kaj de la lokaj samideanoj (kun granda helpo de membroj de Federacio de Lancashire kaj Cheshire en kies regiono troviĝas Blackpool) multaj lernolibroj vendiĝis en la halo mem kaj amaso da informaj folietoj disdoniĝis. Vendiĝis ankaŭ poŝtkartoj kun bildo de la boato, ĉiu en koverto sur kiu estis presita mesaĝo de la fratoj Smith pri Esperanto kaj pri mondregada projekto, kiun ili subtenas.

En sia Raporto *Nia Lernejo* en formo de broŝuro, la estro de la Lymington Secondary Boys' School en Dagenham, dediĉas du paĝojn al argumentoj, kial oni de 12 jaroj instruas Esperanton al la knaboj de tiu lernejo. La interligoj inter la instruistaro kaj la gepatroj estas tre intimaj kaj renkontiĝoj inter ambaŭ partioj ofte okazas.

Japanujo

La 36-a Kongreso de Japanaj Esperantistoj okazis en Tokio la 23/25 de sept. 1949. Partoprenis ĉirkaŭ 130 gesamideanoj, inter kiuj troviĝis unu usonano. En la unua tago okazis Solena Malfermo en la Kultura Akademio kaj en ties kadro oni faris prezenton de la Yoneda-stipendio kaj Ossaka-premio. La unua estas nove fondita per mondonaco de S-ro Tokuziro Yoneda por honori seriozan esploranton de Esperantologio. Ĝin gajnis S-ro Joŝicugu Okamoto pro lia studo pri la Zamenhof-gramatiko. La Ossaka-premio estis fondita en 1939 memore al la 50-jara datreveno de la naskiĝo de la *patro de la japana Esperanto-movado*, S-ro Ossaka. Oni donas ĝin pro "granda merito". Ĉi tiun jaron ĝin gajnis S-ro Kei Kurisu, kiu koresponde multe disvastigis japanan kulturon per traduko de literaturaĵoj, kaj samtempe liveris vastan materialon al japanaj gazetoj el la eksterlando, tiel pruvante la valoron de Esperanto.



Fakkunsidoj scienca, edukista, studenta, laborista, ĵurnalista kaj katolika okazis en la sama tago.

Kongresa Universitato okazis en la salono de la Medicina Fakultato de la Universitato de Tokio. Ĝin malfermis D-ro E. Minami, profesoro en la universitato. Okazis propaganda prelego de S-ro Goro Hani, parlamentano kaj fama verkisto: *Historio kaj Internacia Lingvo*. Pri *Nova Homaro* prelegis usonano S-ro A. C. Blatt, kun interpreto de studento S-ro Simizu. D-ro Hidemiti Oka, profesoro en la universitato prelegis pri: *Viroj kaj Virinoj en la Animala Mondo*.

Amikiĝa kunveno kaj ekzamenoj pri kompetento estis aldonaj eroj en la kongresa programo.

Francujo

Dum la pasinta oktobro S-ro Paul Maureille, Akademi-inspektoro de la Orientaj Pireneoj, faris en la Radio-stacio de Perpignan-Roussillon tre interesan paroladon celante lernigadon de Esperanto. Lin prezentis la federacia prezidanto S-ro R. Llech-Walter. Komence kaj fine de la parolado la konata muzikistaro *Gais Troubadours Catalans* ludis belharmonie *La Espero*.

Propagandan vojaĝon en suda Francujo faris la prezidanto kaj ĝenerala sekretario de la Esperanto-Federacio Languedoc-Rousillon. Post konferenco en Alès (Gard) en la Urba Teatro, ili vizitis sinsekve Nîmes, Manduel, Montpellier, Narbonne kaj Armisson. Tio multe stimulis lokan intereson. Sekvinda ekzemplo!

Kubo

Por kunordigi la propagandan laboron kaj direkti la Esperantistan administradon ĝenerale,

oni fondis en Habana *Kuba Esperanto-Asocio*, kiu agos kiel peranto de U.E.A. en tiu landparto. Oni esperas per la centrigitaj fortoj plejeble ekspluati ĉiujn rimedojn por la antaŭenigo de Esperanto.

Svedujo

Post sia hejmenveno de la kongreso en Bournemouth, F-ino Inga Maj Adamson—mem seminariano en la Seminario de Popolinstruistinoj en Göteborg—estis invitita prelegi pri siaj spertoj en kongresoj en Bern, Malmö, London kaj Bournemouth en kunsido aranĝita de la Seminariista Klubo Esperantista. La rezulto estas, ke F-ino Adamson gvidas kurson kun 30 seminarianoj.

La 22-an de septembro la ĉina verkisto Chun Chan Yeh parolis en la seminario. Ĉeestis pli ol 400 aŭskultantoj, la estro kaj la instruistoj kaj anoj de la du seminarioj. F-ino Adamson tradukis la paroladon, kiu traktis pri la vivo kaj idealo de la ĉina popolo. Tio estis granda sukceso kaj ĉiuj gazetoj de Göteborg donis tutajn kolonojn pri la vizito de S-ro Yeh kaj pri Esperanto.

Itala Esperanto-kongreso

Dum la 3–6 de Septembro la urbeto Varazze kunvokis en sia ĉarma marbordo la italan Esperantistaron. La unuan tagon, sabaton, okazis la interkoniĝa vespero en la belega dancosalono Klubo Margareto. Dimanĉon okazis festa diservo en la preĝejo S-ta Ambroĝo kun Esperanta prediko de Pastro Carolfi. La malferma kunsido estis impresa pro la saluttelegramoj de la Ministro de la Publika Instruado kaj la valoraj certigoj de simpatio flanke de la reprezentantoj de la ŝtataj instancoj kaj gravaj institucioj.

Post la malfermo okazis fotografado kaj akcepto en la urbdomo. Fakkunsidoj plenigis la posttagmezon. London la samideanoj dediĉis sin al serioza laboro. Oni diskutis la aferojn de Itala Esperanto-Federacio, pri la junularo kaj la laborista Esperantistaro. Pastro Carolfi kaj Prof. Pugno impresis per sia raporto pri la klopodoj por enkonduko de Esperanto en la ŝtatajn lernejojn, kaj kun intereso oni aŭdis la raporton pri la peto de Itala Instituto de Esperanto al la Ministerio de Instruado, ke ĝi starigu Esperantan ekzamenon por la Instruista Diploma. Novan estraron oni elektis jene: prezidanto, Prof. Canuto; vicprezidanto, Prof-ino C. Conterno; sekretario, D-ro Borione. La sidejo de la Federacio estas en Torino.

La kongresanoj ĝuis belan ekskurson al Portofino kaj adiaŭan vesperon en Klubo Margareto.

ESPERANTO MALPERMESATA !

Ni bedaŭras informi la tutmondan Esperantistaron, ke la portugala ministro por internaj aferoj oficiale malpermesis la propagandon kaj instruadon de Esperanto en la portugala teritorio.

La ŝtatpolico PIDE (polico por internaciaj aferoj kaj ŝtatdefendo) traserĉis la hejmojn de la direktoroj de Portugala Esperanto-Ligo kaj konfiskis, 23.8.49, ties arkivojn, bibliotekon kaj ceteran dokumentaron.

La nomita Esperanto-organizo estas oficiale likvidita de la ŝtatpolico. Ĉiuj leteroj surhavantaj glumarkojn de Esperanto **estos konfiskataj** laŭ informo de la aludita polico. La portugala Esperantistoj petas la specialan atenton de la eksterlanda Esperantistaro pri ĉi tiu informo ! Precipe orient-eŭropaj Esperantistoj estas petataj ne skribi al la portugala Esperantistoj ĉar la ŝtatpolico estas speciale interesata pri la rilatoj inter portugaloj kaj orient-eŭropaj Esperantistoj !

Prelegvojaĝo de Prof. D-ro I. Lapenna Unuaj rezultoj

Estrarano de U.E.A. Prof. D-ro I. Lapenna komencis sian propagandan vojaĝon en Francujo. Laŭ ĵus ricevita raporto, la komisiito de nia Asocio faris inter 12.IX kaj 10.XI entute 24 publikajn prelegojn en diversaj lokoj de la Pariza regiono, de la Norda regiono kaj en la urboj Reims, Epernay kaj Nancy. La prelegojn ĝis nun aŭskultis ĉ. 3,400 personoj. Krome, multaj Esperantistoj havis la okazon aŭdi la intervjuojn kaj prelegojn elsenditajn de la radiostacio Parizo.

La efiko de la diversaj aranĝoj estis tre kontentiga. D-ro Lapenna kontaktis lerneajn inspektorojn kaj direktorojn, urbestrojn, direktorojn de turisma servo, prezidantojn de komercaj ĉambroj k.t.p. Pluraj prelegoj okazis ekskluzive por la lernantoj aŭ lernantinoj de liceoj, por-instruistaj lernejoj aŭ por studentoj de fakultatoj. La gazetoj regule raportis kaj anoncis tiel, ke la pli larĝa publiko, kiu ne venis al la aranĝo, tamen aŭdis ion pri nia lingvo.

Kutime, post la vizito al iu urbo, la loka grupo tuj malfermis novan kurson. Kelkfoje oni malfermis apartajn kursojn por la gelernantoj. Aliaj aliĝis al koresponda kurso de la Parizo Grupo. Tiamaniere oni utile kaj harmonie kunligas la propagandon kun la instruado de la lingvo.

Prof. Lapenna finos sian vojaĝon en Francujo meze de Februaro 1950, kiam li vizitos aliajn landojn. En la januara numero de *Esperanto* ni publikigos artikolon de D-ro Lapenna pri liaj impresoj de Francujo. Ni deziras al nia estrarano pluajn sukcesojn por la bono de nia komuna afero, al kiu li nun dediĉas ĉiujn siajn fortojn !

Ankoraŭfoje Esperanto kiel lingvo gepatra

En Ateno, ĉefurbo de Grekujo, mi renkontis hazarde bonvestitan knabon, kiu majstris du lingvojn tiom lerte, ke mi miris pri tio. Mi volis aĉeti lanon, sed ĝi estis en la militjaro 1942 nur malfacile ricevebla tie. Mi povis paroli nur kelkajn vortojn Grekajn, ne sufiĉe por komprenigi min, kaj la Germana lingvo estis tute ne komprenebla por la Grekoj. Krome, mansignoj kaj simile ne helpis. En tiu situacio de senpovo mi provis frazon Esperantlingve: "Ĉu vi povas vendi al mi lanon?" Tuj respondis la ĉeestanta knabo kun manieroj de lerta negocisto. "Jes, sinjoro, se vi volos kuniri, mi scias vendejon en kiu vi certe ricevos lanon." Mi estis entuziasmigita aŭdi tiujn vortojn kaj mi kuniris, atingis la celon kaj ricevis lanon.

Sur la vojo al la vendejo mi interparolis Esperantlingve kun la knabo. Interalie li diris al mi: "Mi nun estas 13-jaraĝa kaj ne konas miajn gepatrojn. Mia maljuna amiko Leonidas, kvazaŭ flegpatro, trovis min kiel kriaĉantan suĉinfanon en kortangulo de disfalanta domaĉo. Li kunprenis min kaj faris eksperimenton per mi. Leonidas estas lerta Esperantisto kaj parolis nur Esperanton kun mi. La unuaj sonoj, kiujn mi aŭdis, estis Esperantaj sonoj, vortoj, frazoj. Esperanto iĝis tiamaniere mia gepatra lingvo. Ankaŭ la homoj, kiuj vizitadis Leonidas, uzis la saman lingvon. Kelkfoje mi aŭdis aliajn sonojn. Mi spertis pli malfrue, ke tio estas la Greka lingvo. Miaj kamaradoj, kun kiuj mi ludis ĉiutage, parolis Greklingve. Sed Ateno estas komercurbo. En la haveno de Pireus mi aŭdis kaj provis paroli aliajn lingvojn. De Leonidas mi tiam ricevis nutraĵojn aŭ lokon por dormi nur kiam mi parolis Esperantlingve. Kelkfoje mi ricevis batojn pro tio, ke mi aŭskultis kaj provis paroli aliajn lingvojn. Li ĉiam diris: 'Du lingvoj, kiujn vi majstras, estas pli bonaj ol multaj diversaj lingvoj, kiujn vi fuŝparolas. Majstri ĉiujn lingvojn superas la forton de unuopa homo. La lingva problemo estas nun sufiĉe bone solvita. Esperanto estas uzata internacie, eĉ la Ĉinoj uzas kun bona sukceso la neŭtralan lingvon.'

"Sed mi lernis samtempe la Esperantan kaj la Grekan kaj iomete la Anglan kaj Francan lingvojn. Kiel lerte, vi ja nun aŭdas," diris la knabo. Tiu okazo entuziasmigis min, sed pro la travivaĵoj dum la pasintaj jaroj mi iomete forgesis ĝin.

Mi ekmemoris tion legante en Esperanto-gazeto artikolon pri *Esperanto kiel lingvo gepatra* de N. Birkeli en Norvegujo. Li faris similan eksperimenton kun sia infaneto Sunfloro.

Por la infanoj la afero estas simpla. Ili parolas al la patro aŭ al alia persono, kiel la patro parolas al ili. Se la patrino aŭ alia persono

parolas en alia lingvo la infanetoj devas respondi samlingve. Tiel precipe la patrinoj povas kunhelpi je kreo de interkompreniĝado trudante la neŭtralan lingvon al la netuŝitaj animoj de la venonta generacio de la homaro.

A. Schorcht.

Korekto: En la artikolo *Eĥoj de la 34-a Kongreso* S-ro H.J. erare informas la legantojn, ke "la tria kongreso post la unua milito okazis 1922 en Helsinko, epoko kiam la orienta najbaro de Finnlando honoris nian aferon per eldono de speciala poŝtmarko."

La unua poŝtmarko kun Esperanta teksto aperis ne en jaro 1922, sed en 1925 kaj surhavis jenan tekston: *Inventisto de Radio Popov*.

Okaze de la 40-jara ekzistado de Esperanto kaj la Kongreso en Gdansk en 1927, Sovetunio eldonis specialan poŝtmarkon kun portreto de Zamenhof kaj surskribo *Esperanto XL* (40).

I. Dratwer, Varsovio.

ESPERANTISTA VIVO**Naskiĝoj**

Ahlam al Ges-roj Sune W., estro de Eldona Societo Esperanto en Stockholm, naskiĝis filino Ann-Sofio, 6-an de oktobro, 1949.

Maertens-Mallet al Ges-roj en Brugge, Belgujo la 27-an de Okt. 1949 filo Dirk.

Sekelj al Ges-roj Tibor, Komitatano de U.E.A., filo Diego Rejnaldo, 15-an de septembro, 1949 en Buenos Aires. Plej sincerajn gratulojn!

Edziĝo

Novotny-Ludviková. Anoncas sian geedziĝon, Herta Ludviková kaj Teo Novotny en Liberec, ĈSR, 29-an de oktobro 1949. La soleno okazis Esperantlingve.

Niaj mortintoj

Arnold Max, samideano en Ursprung-Chemnitz, 49-jara. Dato ne komunikita.

Jahn Ernst, agema propagandisto en la iama Laborista Grupo en Braunschweig, 26-an de aprilo 1949.

Kubenz Hermann, multjara delegito de U.E.A. en Bautzen, Germanujo, 25-an de januaro 1949.

Natho Paul, en Magdeburg, Germ., ano de U.E.A., 78-jara; 11-an de marto 1949.

Pfaff Heinrich iama delegito de U.E.A. en Worms, fondinto de la loka grupo, 83-jara; 2-an de aprilo 1949.

Olsson, F-ino E., 30-an de okt. 1949. Dumviva Membro de UEA en Stockholm, Svedujo.

Stumpf Georg, en Klingenberg am Main, 5-an de majo 1949.


Al la parencoj ni deziras esprimi nian profundan kunsenton kaj kondolencon.

Jubileo

Deligny Ernest, en St. Omer, Francujo, Esperantisto de 1900, Honora Membro de U.E.A., membro de la Esperantista Akademio festas 9-an de decembro la 85-an datrevenon de sia naskiĝo. Plej korajn gratulojn!

TRA LA LIBRARO

*=akireblaj ĉe U.E.A.



***La Ĝoja Podio** de Raymond Schwartz. Eld. Esperantista Centra Librejo. 18×12cm. 271p. broŝ. 6ŝ. 6p. bind 8ŝ. 6p.

Kiam en 1926 trafis en la mezon de la Esperanta publiko la *Verdkata Testamento*, la unua verko de Schwartz, ĝi havis la efikon preskaŭ de atombombo. Unu fojon kaj por ĉiam ĝi dispelis la ideon, ke la literaturo de la nova kulturo nepre devas esti serioza, filozofie peza, solida; spirita nutraĵo por sinŝataj kaj respektaj burĝoj. Revenante al tiu malice moka, satire sprita kolekto de karikaturaj, rimaj vortludoj—jes, eĉ al la maldecaĵoj—oni ĉiufoje konstatas, kiom mankis al la kaĉo la kondimenta kontribuo, kiun fine donis Raymond Schwartz. En siaj postaj verkoj, kun escepto de la iom realisma studo *Anni kaj Montmartre*, la pariza diableto kopolde arlekenis por niaj amuzo kaj ĝuo. Kaj nun, post longa intertempo, li proponas al ni ankoraŭ unu pladon por la tiklo de nia palato, kaj la nura mencio jam stimulas al ni la apetiton!

La Ĝoja Podio donas al ni kolekton de versaĵoj, prozaĵoj kaj kelkaj dialogoj-teatraĵetoj. Iuj el ili, kiel iam, karikaturas konatajn figurojn, ĉu en la mondpolitiko, ĉu en la Esperanto-movado; en aliaj R. Schwartz petolas per la vere mirindaj vortkombinoj en rimo-ritma aranĝo, kiujn povas elpensi nur li, kaj jen kaj jen li demonstracias sian unikan talenton je manipulado de la senco mem de vortoj. Ĉio laŭ la konata Schwartz-aj maniero kaj genio. Kelkaj el la pecoj kompariĝas favore kun la plej bonaj en la antaŭaj verkoj, kaj tamen, traleginte la tuton, mi trovis la plengŭon difektita. Mi tial devis fari analizon por malkovri la kaŭzon de tio. Mi jam aludis la longan intertempon, kiu dividas ĉi tiun de la fruaj verkoj, kaj mi inklinaŭ supozi, ke la tragediaj okazaĵoj de tiu periodo iel sin trudas. Povas esti, ke tiu estas pure subjektiva vidpunkto, sed tamen restas fakto, ke mi ne havas inklinton ridi pri la pozadoj, la politikaj manipuladoj, la fuŝfaroj kaj la perfortoj de la ŝtatgvidantoj de la tuj antaŭmilita epoko. Tre verŝajne oni povis siatempe priridi ilin—kaj eble ili meritis priridon—sed legante la karikaturajn nun kontraŭ la fono de la pasintaj dek jaroj oni vole-nevole sentas la teruron en tiuj agoj kaj figuroj, kiujn la aŭtoro karikaturas, kaj la grimacoj de la politikaj klaŭnoj nun alprenas la aspekton de ia timiga fantasmagorio aŭ la spektraj aperaĵoj en malbelega inkubsonĝo. Mi opinias, ke la libro estus multe pli bona sen tiuj aludoj pri la antaŭmilitaj politikistoj. Kvankam ili estas nur malmultaj, la efiko estas tia, ke por mi la atmosfero estas venenita.

Tio ne malhelpu al la leganta publiko akiri ĉi tiun novan kontribuon de Schwartz. Tiu literaturo estas tute speciala en Esperanto, ĉar neniuj aliaj praktikas ĝin. Por tiuj, kiuj konas sian Schwartz, la jena verko donos multe da plezuro; por la novico *La Ĝoja Podio* estas speco de inico, kiun li devas travivi por ekkoni genion en la uzado de nia lingvo.

Lingvajn punktojn oni devas ne tuŝi recenzante Schwartz. Li formulas la proprajn leĝojn kaj same facilanime ilin forĵetas. Do, sub la signo de la gaja muzo, salutojn *La Ĝoja Podio*!

M.S.

Esperanto : The World Interlanguage. Kompilis G. A. Connor, D. Tappan Connor, W. Solzbacher kaj D-ro J. B. Se-Tsien Kao. Eld. The Beechhurst Press, New York. 256p. 18×13cm. bind. 2 Usonoj dolaroj.

Ĉi tiu anglalingva verko efektive estas sintezo de ĉiuj eblaj argumentoj por Esperanto. Zorge dokumentita, ĝi elokvente atestas pri la neceso de lingvo internacia. La kompilintoj prave asertas, ke ĝi vere estas ses libroj en unu, ĉar ĝi konsistas el 1. disertacio pri la problemo ĝenerale 2. lernolibro 3. legolibro 4. informilo pri tio, kiel praktike apliki Esperanton 5.6. Esperanta-Angla kaj Angla-Esperanta vortaroj bazitaj sur modernaj listoj de vortofo en diversaj lingvoj. La propagandisto povas ĉi tie ĉerpi multan municion por sia atako kontraŭ la inerto de la publiko.

Estas bedaŭrinde, ke la *legolibro* fako ne estas tiel senmakula kiel la ceteraj fakoj. Kelkaj devioj de modela uzo estas rimarkeblaj.

Ni tre laŭdas la iniciaton de la usonaj samideanoj kaj esperas ke la verko trafos merititan sukceson.

M.S.

Roza Luksemburg, ŝiaj vivo kaj laboro : de Henriette Roland Holst. Esperantigis Bas Wels. Eld. S.A.T. 236p. 20×14cm. Bindita kun bildo, prezo 2 usonaj dolaroj.

La nomo Roza Luksemburg estas intime ligita kun la gravaj bataloj de la germana laboristaro por la elementaj rajtoj, kiuj estis parte akiritaj post la unua mondmilito. Same ligita estas ŝia nomo kun tiu de Karl Liebknecht, filo de Wilhelm Liebknecht, distinga figuro de la germana socialismo. Luksemburg kaj K. Liebknecht estis la spirita gvidantoj de la Spartakus-ligo kaj ambaŭ estis mortigitaj en Berlino, januaron 1919.

Ni faros pliampleksan recenzon pri ĉi tiu leginda biografio en unu venonta numero de *Esperanto*. Rapida foliumo tra la libro montras, ke ĝi estas objektiva, trankvila kaj ne laŭ la tendenca maniero de tiaj verkoj. Oni devas danki al S.A.T., ke ĝi eldonis ĉi tiun libron, kiu meritas esti akirata kaj legata eĉ de ne-socialistoj.

H.J.

Mason Stuttard :

ANKORAŬ PRI NEOLOGISMOJ

La artikoloj pri neologismoj en antaŭaj numeroj de *Esperanto* postulas respondon pro diversaj erarigaj konkludoj en ili.

La afero de neologismoj ne staras tiel, kiel S-roj Carreira kaj Rossetti difinis ĝin. Dum miaj multaj vojaĝoj post la milito kaj en mia vasta korespondado mi ne renkontis voĉon kontraŭ neologismoj en Esperanto. Se do tia kontraŭstaro fakte ekzistas ĝi devas esti tiel sensignifa, ke tiaj artikoloj apenaŭ havas validan motivon. Precipe en la artikolo de S-ro Rossetti la aludoj “. . . . neologismoj fariĝas ĉe multaj vorto de teruro kaj tabuo ” “Tiu koboldo efektive timigas multajn mildajn samideanojn, kiuj pro teruro ne rimarkas ” kaj “panika oponado” estas hiperbolaĵoj neniel pravigeblaj, kaj estas malfacile diveni la motivon de nia literatura Don Kihoto tiel krei ventmuelilojn simple por la plezuro ilin detrui.

S-ro R. citas multajn verkojn por apogi sian defendon de la neologismo en Esperanto, tamen li malvalidigas sian propran argumenton dirante, ke en la nomitaj verkoj la nombro da neologismoj estas malgranda. Mi mem konstatis, ke la cifero prefere estas mikroskope eta en iuj verkoj kompare kun la grandeco de la koncerna verko. Do la konkludo en lia lasta alineo estas senbaza ; ne la neologismoj donis al tiuj verkoj iliajn meritojn, sed la kompetento de la respektivaj tradukintoj.

Ke Zamenhof enkondukis multajn neologismojn estas vere. La kernan vortprovizon de la Fundamento neniu volus akcepti kiel kompletan. Tamen la argumento, ke enkonduko de neologismoj en lingvon kun 1800 radikoj pravigas la enkondukon, sen reguligo, en lingvon kun jam tridek mil radikoj, apenaŭ estas konsekvenca aŭ logika. Tre povas esti, ke multaj neologismoj ankoraŭ estas bezonataj (mi mem kredas, ke jes), sed tiun konkludon oni atingas alimaniere ol per la lamanta rezonado de nia kontribuinto.

La vera problemo ne estas : ĉu enkonduki aŭ ne enkonduki neologismojn en Esperanton. Tio estas procedo, kiun neniu unuopulo aŭ grupo povas determini. La problemo fakte rilatas al la senbrida enkonduko—plejparte de nerespondaj, neinstruitaj (laŭ Esperanta vidpunkto) kaj diletantaj personoj, kaj personoj kun *amata ĉevaleto*—de novaj vortoj malprudente elektitaj, malbone formitaj kaj iafoje tute nenecesaj, kun la sola rezulto ke niaj gazetoj kaj libroj ĵargoniĝas, niaj vortaroj pleniĝas je senutila balasto, kaj la lingvo-uzo ĉiam pli komplikiĝas.

La postulo pri speciala poezia vortprovizo estas dube valida. La angla estas bona ekzemplo de

lingvo, kiu trairis ĉiujn fazojn de evoluo kaj ĝi siatempe disponis pri *poezia ĵargono*. Post la unua mondmilito tamen la tendenco estas al realismo en la angla literaturo kaj tiaj malfreŝaj rimedoj kiaj *prancing steed o'er the mead* troviĝas en la rezervoj nur de sentimentalaĉaj pseŭdo-poetoj. Amiko mia, profesoro de literaturo en Italujo, informis min, ke la sama tendenco ekzistas ankaŭ en la itala literaturo. Ĉu do niaj Esperantaj poetoj devas laŭiri la longan penigan vojon tra ĉiuj fazoj de la evoluo por fine reveni al la simpla, klara formo de esprimo, kiu estas baza karakterizaĵo de la primitiva Esperanto? Mi konfesas, ke mi vidas en tio nemultan meriton.

La deziro de la specialisto posedi fakan terminaron sekvas el la laika misuzo de teknikaj esprimoj. Kun la paso de la tempo—precipe en la nuna epoko de *populara scienco*—teknikaj vortoj transiras konstante en la komunlingvon kaj tie, fajlita sur la lango de la vulgarularo, ili perdas sian precizan sencon. La fakano tial devas krei al si novajn terminojn, kiuj siavice iom post iom vulgariĝas. Tiu fluo el la faka en la komunan lingvon estas fenomeno de la *naturaj* lingvoj kaj Esperanto certe ne povas esti escepto en tiu rilato.

Sekve estas tre dezirinde, ke en Esperanto—la klara lingvo—oni apliku almenaŭ iom da kontrolo pri la multaj neologismoj, ĉu teknikaj, ĉu poeziaj, kiujn oni enkondukas. Tiam kontrolon oni povas fari nur en la formo de recenzo kaj komentario (kiam la verko jam estas eldonita) aŭ kontrolo de manuskriptoj (kiam klera aŭtoro aŭ eldonisto konscias sian devon antaŭ la Esperanta publiko).

En la lastaj jaroj mi faris multe da kontrolado ĉe manuskriptoj kaj mi ĉiam estas en intima kontakto kun la problemo. Parenteze, mi antaŭ nelonge trovis la jenan belan specimenon : *la latekson oni tapas en kupojn kaj poste rulpremas en ŝitojn*. La tradukinto ne estas anglo. Tio estas ekzemplo de la malserioza aliro al la problemo. La fakto, ke mi forte protestis al la aŭtoro kaj proponis : *la latekson (ŝajne bona vorto por kaŭĉukarbsuko) oni fluidigas en pelvojn kaj poste rulpreme lamenigas* evidente tuj stampas min *milda, terurita, panika* k.t.p. La Esperantistoj mem juĝu.

Antaŭ nelonge ni vidis la enkondukon de *veto* laŭ la latina senco *malpermeso*. Ni verŝajne baldaŭ legos : *Ne faru tion, mi vetas al vi*. Kion pri la fundamenta *vet*? Simile ĉe marista terminaro, kiun mi lastatempe povis kontroli. Tie troviĝis *grundi* kaj *viri* (imagi *grundo de la ŝipo, viro de la ŝipo*!). La signifojn kaj la

paralelecon kun la originlingvoj oni povus tre facile konservi per *grondi* (angle *go aground*) kaj *vejri* (angle *veer*, france *vire*, hisp. *virar*). Tamen kial niaj aŭtoroj mem ne pensas pri tiaj formoj, kiaj evitas konflikton kun jam establita kaj fundamentaj radikoj? La respondo verŝajne estas, ke la teknikistoj, kiuj enkondukas tiajn formojn, efektive estas pli fakanoj ol Esperantistoj, kaj mi venis al la konkludo, ke tre multaj specialistoj, malgraŭ ilia kompetento en sia fako, ne estas kompetentaj en la fako Esperanta.

En la propagando, tiuj samaj homoj plej emfazas la mankojn de la naciaj lingvoj sur la internacia tereno. Ili atentigas pri la fuŝoj en konferencoj kaj kunsidoj pro mistraduko de la nuancoriĉaj vortoj de la naciaj idiomoj; sed ĝuste tiuj homoj strebas, ke Esperanto evoluu (sic) al simila stato de konfuzo per la senĉesa aldono de novaj signifoj al fundamentaj vortoj kaj senĉesa aldono de novaj vortoj al vortoj, kiuj jam bone plenumas saman elementan funkcion. Multaj personoj deziras, ke Esperanto simulu okcidentan nacian lingvon, kaj precipe neanglaj Esperantistoj konstante pruntas vortojn el la angla. Per tio ili konfesas sian mankon de fido al Esperanto, la unika lingvo. Se tiuj personoj sukcesos en siaj penoj, Esperanto iam estos riĉa lingvo, eble la plej riĉa en la mondo, ĉar ĝi estos pruntinta el ĉiuj ceteraj lingvoj sed Esperanto jam ne utilis kiel lingvo internacia. Tiam ĝi estos nur ankoraŭ unu lingvo, kun la konataj komplikaj, dusencaĵoj karakterizaj de la nunaj evoluintaj lingvoj.

La spiritostato de tiaj personoj estas tiu de homo, kiu vidas nur, ke la anglan, la francan, la germanan k.t.p. parolas tiom da milionoj da homoj. Li ne fidas al la tempo, kiam Esperanto vere estos la oficiala internacia lingvo kaj ĝin parolos pli da homoj ol iun ajn alian lingvon en la mondo; kiam Esperantistoj ne bezonos stari humile antaŭ la *grandaj* lingvoj kaj fari kompromisojn por gajni favorojn.

Mi aŭdas jam nun la krion "Utopiisto!" Jes, mi estas utopiisto. Kaj mi volas diri, ke sen tiu utopia revo nia tuta penado estas vana. Sen tiu senŝanceliĝa rigardo en la estontecon nia laboro perdas sian signifon. Kial ni estas Esperantistoj? Kial ni laboras por Esperanto kaj por kio ni laboras? Ĝuste por la plenumiĝo de tiu utopia revo! Ni do frontu al la realo de nia afero kaj ĉesu diletante amuzi nin per ĝi!

Inter la Esperantistoj troviĝas homoj, kiuj ĵargonigas nian lingvon en la nomo de arto. Por ili Esperanto ĉesis esti provo de lingvo internacia, sed fariĝis nura artobjekto, kiun ili povas manipuli kaj tordi laŭ sia bontrovo, laŭ la maniero de la "modernaj" pentristoj antaŭ kies tolaĵoj

gapadas rondoj da gejunuloj, firme kredantaj, ke ili staras en la avangardo de la progreso; kaj ju pli bizara la bildo, ju pli stranga la titolo—*Inferioria komplekso de graveda bufo* aŭ simile—des pli progresemaĵ ili sentas sin. Ni tamen rekonu niajn "progresemaĵojn" laŭ ilia vera valoro laŭ *vidpunkto de lingvo internacia*. S-ro Carreira emfazas la *popolan karakteron de Esperanto*. Mi volas insisti pri tio. Ni do rekonu la anarkion de tiuj homoj kaj ilian ekstreman egoismon. Progreson ni deziras kaj progreson ni faras, sed la progresigo de nia afero ne estas la speciala privilegio de ia elito. Tiaj kultoj fontas en intelekta snobismo kaj tendencas krei dividojn—novajn specojn de klaso—en niaj vicoj. **Esperanto estas popola movado; la popolo daktu la iradon!**

Apliko de Esperanto en scienca gazeto

Antaŭ iom da tempo ni raportis, ke en la grava gazeto por teoria fiziko *Progress of Theoretical Physics*, aperanta kvaronjare en Japanlando kaj redaktata plejparte en la angla lingvo, dum 1948 aperis sciencaj artikoloj verkitaĵe tute en Esperanto. Ni povas nun anonci, ke aperis du pliaj artikoloj Esperantaj (April-Junio 1949) en la sama gazeto. Syōhei Miyahara (de Nagoja Universitato) verkis artikolon naŭpaĝan sub titolo *Pri la teorio de kolektivaj elektronoj de fero-magnetismo*. F. J. Belinfante (de Purdue Univ., Usono) verkis sespaĝan artikolon *Pri la kalkulado de elektromagnetaj fenomenoj per kampo de neŭtraj vektor-mezonoj kun neglektembla maso*. Ambaŭ artikoloj havis mallongan anglalingvan resumon.

Trovinte la pli fruan artikolon en la gazeto, Prof. Belinfante skribis al Japano Esperanto-Instituto por peti kontakton kun japanaj fizikistoj. JEI plenumis lian peton kaj instigis lin verki artikolon por la nomita gazeto. La artikoloj vekis sensacion inter japanaj fizikistoj, kiuj esprimis favoron por la uzo de Esperanto en tiu fako. Verŝajne multaj artikoloj en Esperanto sekvos.

STARPUNKTOJ!

S.A.T.

Ĉiu ero da energio, ĉiu monero elspezata por la neŭtrala esperanta movado signifas samproportcian perfidon al la S.A.T.-movado. (Sennaciulo nov. 1949).

U.E.A.

Ĉiu ero da energio, ĉiu monero elspezata por la praktika apliko de Esperanto estas por la bono de la tuta movado.

M.S.

Nia Felietono :

KAPTITOJ SUR LA GLACIROKO

F. Omelka

IX. La Verdikto (*daŭrigo*)

Marcel Payen apenaŭ finlegis tiun ĉi komunikon kaj fermis la okulojn. Li ne povis legi pro emocio.

Nur post kelkaj momentoj li demandis :

“Kaj kiamaniere ili eksciis tion, sinjoro Generalo ?”

“Ni aranĝis la aferon tuj post alveno en la malsanulejo.”

“Mi dankas vin, amikoj. Kaj vin, sinjoro Generalo, mi devas danki aparte pro tiu biskvito.”

“Nu vi al mi pro la biskvito, mi al vi pro la vivo. Mi opinias, ke vi malgajnas, Payen !”

* * * *

La elartikigita maleolo estis jam en ordo. La laciĝo iom post iom malaperis.

“Post kelkaj tagoj ni liberlasos vin,” diris la kuracisto dum la vizito. “Kaj vi ceteraj povas esti ankaŭ kontentaj.”

“Kaj la piloto ?” ili demandis.

“Liaj vundoj estas pli gravaj,” respondis la kuracisto, “sed danĝero jam ne estas.”

Alproksimiĝis la tempo de la vizitoj. Sinjorino Gibson, la stevardino, Bakker, la radiotelagrafisto Bernier. Bukedoj kaj ridetoj

“Mi adoras la aviadilojn kaj—mi ne timas ilin !” komencis gaje la nederlanda komercisto.

“Kiel tio estas ebla, sinjoro Bakker ?” ridis Payen.

“Mi pensas tute logike,” interrompis lin Bakker. “Post tia frakasigo ni povus atendi, ke ni estos absolute pereigitaj. Sed ni restas tutaj. El tio ni povas fari nur konkludon : ke la plej grandan malbonon ni jam travivis.”

“Kaj kion vi diras al la—morto ?”

“Oni diras, ke la morto mem ne estas tiom malbona. La plej malbona estas laŭdire la mortado—kaj tion ni jam travivis. Brrr ! Kiam mi rememoras, kiel mi balanciĝis en tiu neĝblovaĵo !”

Post kelkaj tagoj ili disveturis. Ili interŝanĝis reciproke adresojn kaj promesis al si, ke ili korespondos kune. Tiuj kelkaj tagoj sur la glaciroko neniam malaperos el ilia memoro—

* * * *

Kiam venis Marcel Payen al la juĝistaro kiel atestanto, la juĝhalo estis plenplenigita.

Dum lia eldiro la homoj preskaŭ ne spiris. Ĉiuj sciis, kion li faris por savi sian amikon.

“Tio ja estas eldiro tiom grava,” diris la prezidanto de la juĝistaro, “ke la proceson kontraŭ la akuzito ni povas tuj fini. Sed permesu al mi ankoraŭ unu demandon. Se vi forbrulis la originalon, poste estas klare, ke iu faris fotografajn kopiojn. Kiu ?”

“Ĉi tiun demandon povas respondi mi,” anoncis la defendanto de Daumal. “Nome la nova atestanto, kies allason mi petas.”

La juĝistaro plenumis lian peton.

La defendanto mansignis al juĝeja servisto. Tiu malfermis pordon kaj en la juĝhalon venis germana oficiro. Ia kaptito.

“Ĉu vi scias, kial vi estas vokita ?”

“Jes, sinjoro prezidanto,” aŭdiĝis pura franca lingvo.

La oficiro estis ano de spion-servo apud la germana general-stabo. Kiam la planoj de Daumal estis ĉe la ministerio, li sukcesis subaĉeti influan oficiston, kiu ebligis al li fotografi ilin

Liberiga verdikto estis eldirita la saman posttagmezon.

Unu horon pli poste kuris tra la stratoj gazetvendistoj kaj kriis :

“*Paris Soir !* La proceso kontraŭ Jean Daumal finita ! Juĝhalo ĝojkrias post eldiro de la verdikto ! La atestanto Marcel Payen salutata de la publiko ! *Paris Soir ! Paris Soir !*”

La ĵurnalo alportis fotografajn de Jean Daumal kaj Marcel Payen, kiam ili forlasis la juĝhalon. Kvankam estis tiom da aferoj, pri kiuj oni povus paroli, ambaŭ amikoj silentis.

Fino

Ricevitaj : **Polychètes Pélagiques** de C. Støp-Bowitz. Franclingva traktato kun Resumo en Esperanto pri la Pelagaj Poliĥetoj de la norvegaj antarktaj ekspedicioj de la *Norvegia* 1927–28, 1928–29 kaj 1930–31.

Køge ilustrita faldfolio pri Køge kaj la ĉirkaŭaĵo. Senpage ricevebla ĉe : Turistforeningen, Køge, Danlando.

Balkanturist : ilustrita broŝuro pri Bulgarujo ricevebla ĉe : Kooperativa Presejo “*Esperanto*”, str. Tri uŝi 15, Sofia, Bulgarujo.

Across Frontiers : monata revuo por mondregado kun bonega Esperanta rubriko redaktata de nia kunlaboranto E. P. Ockey.

Unuataĝa Karto kun poŝtmarkoj festantaj la jubileon de la Universala Poŝto Unio, akirebla kontraŭ 5 rpk. ĉe Esperanto Kultur-Servo, Jolsva u. 4, III, Budapeŝt, Hungarujo.

ESPERANTO KAJ RADIO

Mallongigoj : I=Informoj, P=Parolado, K=Kurso.

Ĉiutage	14.45–15.00	Praha. 1935m. kaj 31.41m. I. Ĉeĥoslovaka Radio, Esp.-sekcio, Stalinova 12, Praha XII.
	17.15–17.30	Paris. 48.82m. Radio-diffusion Francaise, 118 • Champs-Elysées, Paris 8.
	18.45–19.00	Sofia. 39.11m. P. Radio Sofia.
	21.00–21.15	Praha. 49.92m. P.
Dimanĉo	05.30–05.35	Wien. 506m., 31m., 41m. I.
Lundo	07.15–07.30	Sveda Radio. 49.46m., 27.83m. P. Sveriges Radio, Stockholm 7.
	15.15–15.30	Sveda Radio. 19.80m., 27.83m.
	16.30–17.00	Rio de Janeiro. 375m., 30.71m. K. Rádio Ministério da Educação e Saúde, Rio de Janeiro, (DF), Brazilo.
	21.45–22.00	Praha 470m., 325m., 259m.
Mardo	01.15–01.30	Sveda Radio. 49.46m., 27.83m.
	08.05–08.20	Paris. 386.8m. K. (Ĉiun duan mardon de 18.X).
	11.55–12.00	Bern. 48.66m., 31.46m., 16.87m. P. D-ro Baur. SRG, Kurzwellendienst, Neuengasse 28, Bern.
	14.15–14.30	München. 405m. kaj 48.70m. kaj Nürnberg 315.8m. K. (ĉiun duan mardon). Radio München, Kulturabteilung, Rundfunkplatz 1, München, Bayern, Germanujo.
	17.40–17.45	Bern. Kiel je 11.55, sed anst. 16.87m. sur 19.60m. (Krom la unua mardo).
Merkredo	19.15–19.30	Warszawa III. 48.23m. I. Pola Radio, Warszawa, Koszydowa 8.
	21.45–22.00	Praha kiel lunde.
	22.15–23.00	Praha II. 269m., 325m., 219m. Verda Stacio nur la unuan merkredon. Stalinova 12, Praha XII, ĈSR.
Ĵaŭdo	11.55–12.00	Bern. Kiel marde. D-ro Privat.
	17.40–17.45	Bern. Kiel marde. D-ro Privat.
	22.00–22.10	Ostrava. 259m.
Vendredo	15.40–15.55	Wien. 228m., 25m., 31m., 41m. I. Ĉiun duan vendredon. Radio Wien, Argentinierstr. 30a, Wien IV.
	20.50–21.00	Praha. 269m., 325m., 470m. I. Stalinova 12, Praha XII.

Klarigo—En la tabelo la horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon.

Ĉiujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 25 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

Grava Radio-elsendo !

Sekve de peto de la sekcio de Flandra Ligo en Gent, B.N.R.O. (Belga Nacia Radio-Instituto) dissendos flandralingve la teatraĵeton de samideano P. Van Der Poel *Het rijzen van de groene ster* (La leviĝo de la verda stelo) 14-an de decembro je 17-30 (mezeŭropa aŭ greniĉa tempo ??) sur ondolongo 204m. La estroj de la loka stacio

promesis krome dissendi la rubrikon *Wereldnieuws* (Mondnovaĵoj) de *Flandra Esperantisto*. Koran gratulon al la Liganoj en Gent !

ENIGMA KONKURSO N-ro 43

Solvojn oni sendu al S-ro P. H. Mooy, 20-A Avenue Molière, BRUSSEL-Forest, Belgujo.

Gajnis la premiojn post kontrolo de la 39-a konkurso : S-ro A. Stanura (ĈSR) 108p., S-ro S. Roelofsen (Ned.) 102p., S-ro F. Kreutzberg (Germ.) 98p.

Enigmo N-ro 90 : La tuto konsistas el 56 literoj kaj formas deziron de mi al vi. La sama nombro ĉiam prezentas la saman literon (ne male).

30-16-8-27-55	..	..	ligna koloneto
42-26-33-4-56-34-12	..	..	verda likvoro
44-20-43-39-49-7-11-45	..	..	pika batalilo
51-22-37-25-2-50	..	..	feŭdulo
38-47-46-36-52-6-12	..	..	senhonora homo
17-14-29-23-18-26-19-39	..	..	spicaĵo farita el la radikoj de tropika vegetaĵo
13-53-24-3-9-10-15-32	..	..	diskuti pri la prezo
41-54-4-33-34-28-48-45	..	..	adepto de iu religio
35-5-31	..	..	ne pli ol
1-40-9-30-19-50-29-14-21-13-55	..	..	eraro pri la dato de historiaĵo

Enigmo N-ro 91 : Formu 23 sesliterajn vortojn laŭ la donitaj signifoj. Ĉiuj du sinsekvaj vortoj havas kvin komunajn literojn. La lasta vorto estas la sama kiel la unua. La signifoj de la vortoj estas : 1. sankta skribaĵo ; 2. duonrido pro malica moko ; 3. subita, ofte senkaŭza teruro ; 4. pentrilo ; 5. kartludo ; 6. konfidi al iu valorajon gardotan ; 7. parenco ; 8. majeste ; 9. gajnotaĵo ; 10. mezurunuo ; 11. senluma kesteto ; 12. signo de amo ; 13. surskribo sur koverto ; 14. alta ebenajo por ĝui belvidon ; 15. verko moke ridindiganta iun ; 16. despoto ; 17. okulmembrano ; 18. ĥemia elemento ; 19. kontraŭo de arto ; 20. teksaĵo ; 21. hejmbesto ; 22. boato ; 23. kiel 1.

Enigmo N-ro 92 :

$$\frac{BB}{\dots} \times \frac{\dots}{ACCC} \times \frac{\dots A}{EE} = \frac{E \cdot A}{A \dots} \times \frac{A \dots}{ABCD} \times \frac{A \cdot D}{\dots D}$$

En la ĉi-supraj produktoj ĉiuj frakcioj estas neplisimpligeblaj. Ĉiu numeratoro kaj ĉiu denominatoro estas la produkto de du el la primoj inter 10 kaj 55. En la ses denominatoroj ĉiuj primoj inter 10 kaj 55 estas po unufoje uzitaj. La punktoj kaj la literoj prezentas ciferojn (la sama litero ĉiam la saman ciferon), kaj la cifero, prezentata per A troviĝas nur tie, kie A estas indikita. La ciferoj prezentitaj per A, B, C kaj D formas en certa sinsekvo aritmetikan progresion. Kiuj frakcioj tie ĉi estas multiplikitaj ? Aldonu la argumentadon !

Eksterkonkurse mi proponas al la frandemuloj en la aritmetika kampo la jenan problemon : La frakcio $\frac{a}{b}$ en kiu **a** estas malpli granda ol **b**, egalvaloras al simpla perioda frakcio, kies periodo konsistas el 30 ciferoj. Se **b** estas primo kaj la naŭa, deka, dekunua kaj dekdua ciferoj en tiu periodo estas laŭvice 5, 8, 9, 2, kiu estas la frakcio $\frac{a}{b}$?

Mi ne intencas publikigi la solvon en nia revuo ĉar ĝi postulus tro multe da spaco, sed mi tamen volonte sendos ĝin al veraj interesatoj, kiuj sendos al mi siajn notojn pri tiu problemo, kondiĉe ke oni aldonu respondkuponon.

Dankon. Ni deziras esprimi al S-ro T. K. Slade nian sinceran dankon pro kompilo de la Indekso. (*Red.*)

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Centra Oficejo : Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

OFICIALA INFORMILO

N-ro 221.

5-an de Novembro 1949

NOVAJ DELEGITOJ

Belgujo

Blankenberge. D : A. Marmenout, Malecotstraat 24.
Tel : 421.21.**Brussel.** VD : E. Cortvriendt, P. van Humbeekstraat 3,
Brussel-W.**Gent.** VD : F-ino J. Terriijn, Raapstraat 74.**Sint-Kruis.** D : G. Maertens, Pr. Leopoldstraat 51.**Sint-Pieters-Leeuw.** D : M. C. Monnaers, Pierre Walkiers-
straat 19.

Britujo

Bishop Auckland. D : F-ino M. Jay, 21 Westfield Road.**Robin Hood's Bay.** D : F-ino E. G. Spark, "Harboro,"
Thorpe Lane.

Finnlando

Helsinki-Pakila. D : Lauri Lemberg, Toivola.

FD (Ĝardenkulturo) : La D.

Koski T. I. D : F-ino Veera Lauranto, Patakoski.**Oulu.** D : A. Mehtonen, Isokatu 67. Tel : 4775.**Outokumpu.** D : Valdemar Lampinen. Tel : 312.

Nederlando

Groningen. VD : J. V. Holleman, Adm. de Ruyterlaan 12.**Wassenaar.** D : A. A. Suerink, Louisestraat 13.

FD (Ĉarpentado) : La D.

Svislando

Zug. D : H. Herrmann, Vorstadt 24. Tel : 40416.

ŜANĜOJ

Brazilo

Santos. D : nova adreso : Rua Paraguai 148.**São Paulo.** FD (Instruado) kaj FD (Komerco) : nova
adreso : Edifício Guarani, Parque D. Pedro II,
1092, 12, ap. 126.

Britujo

Troon. D kaj VD : nova adreso : 8 Morven Crescent.

Finnlando

Pori. VD kaj FD (Teozofio) : nova adreso : Poŝtfako 11.

Svedujo

Höganäs. D kaj FD (Kontraŭalkoholismo) : nova adreso :
Brasagatan 6.

Svislando

Pratteln. D : vakas.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

J. Pavlacky, Veseli n. Mor., Ĉeĥoslovakujo.

F-ino N. Hanson, Halifax, Anglujo.

D-rino F. L. Wickelgren, Buckhurst Hill, Anglujo.

PATRONOJ 1949

16. S-ro L. A. Churchill, Derby, Anglujo.

MEMBRO-SUBTENANTOJ 1949

362. F-ino I. H. Niven, Alderley Edge, Anglujo.

363. G. Åsemyr, Hjärteby, Svedujo.

364. S-ro J. Pi, Haut Vernet, Francujo.

DONACOJ. C. J. Kitching 15ŝ., F-ino A. Baxter 5ŝ.,
F-ino M. E. Reid 2ŝ. 6p., E. Mila 10ŝ., V. F. Haskell 6p.,
F. C. Midas 2ŝ. 6p.

Sinceran dankon al ĉiu helpanto.

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la 31a de
Oktobro 1949, kaj ankaŭ, por komparo, je la fino de
Oktobro 1948 :

	1948	1949
Asociaj membroj ..	9453	7204
Individuaj membroj :		
MJ	966	839
MA	4513	4348
MS	344	363
Patronoj ..	21	16
DM	172	186
HM	56	60
	6072	5812
	15525	13016

Jarlibro. La dua parto de la jarlibro eliris meze de
Novembro. Se iu paginto ne ricevis ĝin li informu la
Centran Oficejon.C. C. GOLDSMITH, *Sekretario.*

INTERNACIA KONKURSO 1949

Stato je 31-a de Oktobro

Lando	Kvoto	Poentoj	%
1. Jugoslavujo	1600	3245	202.8
2. Islando ..	500	650	130.0
3. Svedujo ..	4100	5034	122.8
4. Belgujo ..	1700	1956	115.1
5. Portugalujo	700	765	109.3
6. Germanujo ..	1600	1740	108.7
7. Brazilo ..	2000	2146	107.3
8. Urugvajo ..	250	255	102.0
9. Usono ..	3000	3011	100.4
10. Britujo ..	13000	12955	99.7
11. Aŭstralio ..	950	935	98.4
12. Danujo ..	3200	3040	95.0
13. Nederlando	5400	5042	93.4
14. Nov-Zelando	900	839	93.2
15. Svislando ..	1400	1265	90.4
16. Polujo ..	4000	3595	90.0
17. Italujo ..	1600	1425	89.0
18. Francujo ..	6200	5121	82.6
19. Sud-Afriko ..	250	210	82.0
20. Argentino ..	900	735	81.7
21. Finnlando ..	2000	1595	79.8
22. Norvegujo ..	1300	1025	78.8
23. Egiptujo ..	300	225	75.0
Kanado ..	300	225	75.0
24. Hungarujo ..	1800	1320	73.3
25. Izraelo ..	400	240	60.0
26. Irlando ..	300	175	58.3
27. Aŭstrujo ..	1000	565	56.5
28. Hispanujo ..	1200	530	44.2
29. Bulgarujo ..	1600	310	19.4
30. Ĉeĥoslovakujo	5300	545	10.3

2-a Kongreso de I.F.E.F.

La 2-a internacia kongreso de Internacia
Fervojista Esperantista Federacio okazos de la
17-a ĝis 21-a de Majo 1950 en Salzburg, Aŭstrujo.Notu la daton kaj klopodu partopreni ! Detaloj
sekvos.

Leteroj de L. L. Zamenhof



**La tragedio de lia vivo rivelita de lia ĵus
retrovita korespondo kun la francaj
 eminentuloj. Prezento kaj komento de
Prof. G. Waringhien.**

1a volumo, 1901–1906

388 paĝoj

2a volumo, 1907–1914

374 paĝoj

21 × 14.5 cm., bindita

NOVA PREZO : ĉiu volumo 21ŝ. 6p., afr. 9p.

La korespondaĵoj de eminenta homo ĉiam
konigas detalojn de vivo, karaktero kaj
sentimento de la skribinto tiel ke personaj
leteroj kompletigas biografiojn. En tiu ĉi
libro ne temas nur pri leteroj de la majstro,
sed ankaŭ pri tiuj direktitaj al li de francaj
gvidantoj de nia ideo en la frua epoko de la
movado. Tiu ĉi libro lumigas la pasintecon
kaj detruos aron da legendoj.



Mendu ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

ATENTON !

ATENTON !

La Instituto de Ekonomia Geografio ĉe
Markomerca Altlernejo (WSHM) strato
A. Czerwonej 101, en Sopot, Pollando,
deziras interŝanĝi ekonomiajn aŭ fizikajn
LANDKARTOJN kun ĉiu lando, precipe kun
ekstereŭropaj, kontraŭ fizikaj landkarto
de nuntempa Pollando. La larĝecoj estas :
1 ; 1 000 000, 1 ; 750 000, 1 ; 500 000.

La landkarto estas bele presita sur forta,
dika kaj glata papero, je formato de
115cm × 140cm.

Bonvolu senhezite skribi al la supra
adreso. Respondo kaj elsendo de landkarto
garantiataj.

NONI KAJ MANI

de

Jön Svensson

Tradukis

Paul van den Hövel

Rakonto pri la spertoj de du malgrandaj
Islandaj knaboj, kiuj perdiĝis sur la
vasta maro.

Bele presita sur bonega papero.

160 paĝoj

Broŝ. 2ŝ. 9p. aŭ 11 rpk. afrankite



Mendu ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

Ĉiu serioza Esperantisto, ĉu komencanto, ĉu progresinto, serĉas konstantan normon pri uzo de vortoj. Post longa intertempo denove estas havebla tiu jam fama konsultilo, kun ampleksaj klarigoj kaj citaĵoj el Zamenhofaj verkoj, la Tria Eldono de

PLENA VORTARO DE ESPERANTO

de E. Grosjean-Maupin, A. Esselin,
S. Grenkamp-Kornfeld, G. Waringhien.

Esperanto-Esperanta.

Prezo 28ŝil. 6p., aŭfranko 9p.

Bonvolu atenti, ke ĉi tiu estas fotografa (ofseta) represo de la dua eldono, sed NE reviziita eldono. Tiu ne aperos ĝis post tre longa tempo.

Mendu ĉe
UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo.

ALEKSIS KIVI

SEP FRATOJ

Klasika verko el la fora nordlando.

Ekkonu la animon de la finna popolo per ĉi tiu bela traduko en vigla, kolorplena lingvo.

Romano kun la tuta ĉarmo de popolkanto.

360 paĝoj.

Prezo : bindita 16 ŝil. 6p., broŝ. 13 ŝil., aŭfranko 6p.

Eldonita de
ELDONO VILHO SETÄLÄ, HELSINKI.

Mendu ĉe
UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo